



# October, 1926

Page

The Bible in Esperanto .......... 1
The Esperanto-Diservo ĉe la Philadelphia Kongreso .......... 3
The Edinburgh Congress .......... 4
Book Review .......... 6
For the Beginner .......... 7
Unufemura Gruo .......... 9
Second Course in Esperanto .......... 10
Malpermesa Leĝo de Finnlando .......... 13
Official Roots Apt to be Misused .......... 15

KORESPONDANTOJ

Finnlando: Erkki S. Turunen. Litovujo: Pulgis Lemaitis.
Italujo: Allessandro Mazzolini, L. K.
Hungarujo: Puskas Latvan.
Francujo: Salo Grenkamp, L. K.

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN OF
THE ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, Inc.
A propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.
Yearly Memberships: Regular $1.00; Contributing $3.00; Sustaining $10.00; Life Members $100.
HERBERT M. SCOTT, L. K., Editor

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.

### BERKELEY, CALIF.
Berkeleja Esperanto Rondo.—Hilda F. Mills, Secy., 18 Northampton Ave., Berkeley, Calif. Meets Saturdays 7.30 P. M., Meeting House of Society of Friends.

### SAN FRANCISCO, CALIF.
Esperanto Association of California, Inc.—Rooms 309-311 de Young Building, San Francisco. Miss L. J. Marshall, Sec.

### MONTREAL, CANADA.
Montreal Esperanto Association: Meets each Monday evening at 8 in Room 25, 747 St. Catherine St., West, Sek. G. E. Warner.

### WASHINGTON, D. C.
Kolumbia Esperanto Asocio, and class, first, third and fifth Thursdays, 8.00 P. M. During the summer, 706 11th St., N. W., Apt. 53.

### CHICAGO, ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.
La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

### ROCKFORD, ILLS.
Scandinavian Esperanto Institute, 221 7th St.

### BOSTON, MASS.
Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. Miss M. Butman, Secretary.

### WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

### BALTIMORE, MD.
La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

### DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 2916 East Grand Blvd.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M. to 9 P. M. except Tuesday and Friday. Classes meet Tuesday and Friday, 8.10 P. M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

### NEW YORK CITY, N. Y.
The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 63 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

### WEEHAWKEN, N. J.
Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

### CLEVELAND, OHIO.
The Cleveland Esperanto Society, 9010 Detroit Ave., every Tuesday, 7.30 P. M. S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

### TORONTO, CANADA.
Por informoj pri la kunvenoj de la Toronta Esperanta Societo, skribu al la Sekretario, Sinjoro D. W. M. Jenkins, 514 Jarvis Street, Toronto, 5.

### PHILADELPHIA, PA.
Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y. West Phila. High School for Boys. Monthly meeting for business every fourth Friday at Y. W. C. A., 18th and Arch Sts., 8.15 P. M. Social and class meetings on same hour and place on other Fridays. Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.).
Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

### PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

### MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

### ST. PETERSBURG, FLORIDA.
Amikeco Rondo meets Tuesdays 4.00 P. M., Fridays 8.00 P. M. E. E. Owen-Flint, Sec. 211 7th Ave. North.

### TOPEKA, KANSAS.
Topeka, Kansas Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-iino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

# Amerika Esperantisto

ORGANO
de la
ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO
507 Pierce Bldg., Copley Square
Boston 17, Mass., U. S. A.
ONE DOLLAR A YEAR

Vol. 36. October, 1926. No. 6.

## THE BIBLE IN ESPERANTO

by W. M. Page

In St. Giles' Cathedral, Edinburgh, Scotland, during the Eighteenth Universal Congress of Esperanto, on Sunday morning, August 1, 1926, the Esperanto Bible was formally dedicated prior to publication. No more suitable place could have been selected for this notable ceremony. There is no country in the world in which the Bible holds such an important place in family life as in Scotland,—"Bible-loving Scotland" it is often called,—and within the walls of St. Giles' the first Bible issued in Scotland was printed. Here in the ancient church of which John Knox, the reformer, was once minister, were gathered men and women from forty different countries to take part in this solemn service.

"Al Dio nun kun ĝoja kri'
Alvenu ĉiu terloĝant',
Por servi lin en harmoni'
Kaj laŭdi lin per gaja kant'."

To the familiar tune "Old Hundredth," from the Genevan Psalter of 1551, this noble psalm rose from the blended voices of the vast congregation. There was a call to prayer, and then the hushed assemblage bowed before God. At the words "Patro nia" hearts and lips moved in the Lord's Prayer. Then the four ministers taking part, and representing different religious denominations, stood at the chancel steps, where Mr. John Mabon Warden, vice-president of the Esperanto Academy, handed to each a specially bound copy of the Bible printed on India paper. The congregation having joined in singing the hymn

"Dia vorto restas,
Nia gvido estas;
Lumas ĝi la vojon,
Donas puran ĝojon."

Rev. William Ross, of Edinburgh, pronounced the words of dedication, followed by prayer. Rev. A. J. Ashley, Farnley Tyas,

Huddersfield, founder of the Church Esperanto League, proceeding to the lectern read the first twelve verses of the eighth chapter of Nehemiah. At the conclusion of this the Cathedral choir sang Handel's "Hallelujah Chorus" in Esperanto. Then Rev. John Beveridge, of Gartmore, read as the New Testament lesson St. Luke IV, 14-22. After the hymn "Ho anĝeloj! La Sinjoron adoradu en ĉiel'!" to the tune "Austria," Rev. Dr. Grahame Bailey, Lecturer on Oriental Languages in the University of London, preached the sermon from the text:"...... la sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo," II Tim. 3.15. He pointed out that this new translation of the Bible was the first ever made in an artificial language. What, he asked, was the meaning of a Bible translation? Almost every day thousands of books were published, many of them excellent, giving information on countless subjects, but the Bible alone gave clear and accurate teaching about God and divine things. There was a tendency to neglect the Old Testament, but they should imitate the Apostles in the value they attached to that book. One hundred years ago it was prophesied that the Bible would go out of print, but far from being worn out it was sold in greater numbers every day, and widely influenced the lives of its readers. The service concluded with the singing of the great German hymn

"Nun Dion danku ni
Per mano, voĉo, koro!"

A wonderful service indeed, in which music and architecture and eloquence combined to create the very solemn impression that all present were taking part in a great historic event!

On the following day, when copies of the translation were obtainable by members of the Congress, they were rapidly sold out. The cheapest copy costs $1.50, and there is a **de luxe** edition on India paper with soft yapp binding which sells at five dollars. The purchasers were charmed at the appearance of the book and the clearness of the type. The whole production reflects the greatest credit on the producers, the British and Foreign Bible Society, London, and the National Bible Society of Edinburgh and Glasgow. During the Esperanto Congress the names of the generous donors by whose munificence publication was made possible were disclosed. The Societies had stipulated that all expense up to the cost of printing should be paid. This has been met by the Misses Peckover of Wisbech, England. It has cost them $10,000 in all to make the Esperanto Bible available to the public at so cheap a price. To these ladies the gratitude of the Esperanto world is due.

It is no exaggeration to say that with the publication of the Bible in Esperanto the international language assumes a new importance, and acquires a fundamental basis which is common

to all cultural languages. The Bible is the supremely great literature of humanity. Great as the works of Shakespeare are, they are only one form of literature, the drama, and to be thoroughly enjoyed they must be spoken by an actor in the theatre. The Bible is written in the simplest language, and has such variety that the wisest thinker and the little child can read it and enjoy it. It contains history and poetry, law and morals, philosophy and proverbs, biography and drama. Its thought and expression have been wrought into the daily speech of every civilized people.

It is a significant fact that the Old Testament, the library of the Jewish people, has been translated into Esperanto by the author of Esperanto, Dr. Zamenhof, himself a Jew, and acquainted with Hebrew from his childhood. That in itself should tell us that the translation has been adequate, and in so far as the Esperanto is concerned authoritative. But before publication, the Bible Societies made it a condition that the manuscript be compared with the original by a British Committee. This has been done, and the Committee have testified to the fidelity of Dr. Zamenhof's work. Further than that the Committee have adjusted the translation of the New Testament, already published under the same auspices in 1913, so as to bring it into complete accord with the Old. It may therefore be claimed that from now on the Esperanto Bible takes its place as the supreme authoritative book of the international language.

## LA ESPERANTO-DISERVO ĈE LA PHILADELPHIA KONGRESO

Unu el la plej interesaj okazoj de la E. A. N. A. kongreso en Philadelphia je la monato Julio estis la religia diservo en Esperanto. Frue en la mateno de dimanĉo la kongresanoj veturis al Arden, Delaware, kaj kunvenis en la bela natura teatro. Tie, en la kvieto, sub la pacaj arboj, oni havis senpartian diservon, en kiu ĉiuj povis partopreni, kiaj ajn estas iliaj religiaj kredoj.

Sinjoro Morton kaj Profesoro Bye kune kondukis, Sinjoro Morton leginte kaj preĝinte, Profesoro Bye predikinte kaj kondukinte la himnojn. Post la himno "Restu kun Mi," kantita de ĉiuj, estis la responda legado de Korintanoj, Ĉapitro 13, el la Nova Testamento. Ĉiu tiam diris la "Patro nia" preĝon. Sinjoro Hetzel nun kondukis la Esperantan himnon, "La Espero." Post legado el la Biblio venis la prediko, sekvita de la himno "Marŝu ĉiu paca." Preĝo de Sinjoro Morton finigis la diservon.

Estis por la kongresanoj neofta privilegio aŭdi predikon en Esperanto. Profesoro Bye prenis por temo la ideon de kunla-

borado, temo kiu bone akordas kun la internacia spirito de Esperantismo. Li montris kiel ekzemploj de kunhelpo estas troveblaj en la natura mondo, inter la bestoj, la insektoj, kaj eĉ la plantoj. Tiam li esplikis kiel inter la homoj la industria laboro estas dividita, ĉiu farante unu apartan taskon, kaj interŝanĝante sian produkton por la produktoj de la aliaj. Tial ne baraktado, sed kunagado estas la universala leĝo de la vivado. Nur per kunhelpo inter la homaro, individue, interloke, internacie, atingas ni al la progreso. La ekzistado estas kooperativa afero. Tiu fakto metas sur la ŝultrojn de ĉiu respondecon. Estas nia devo faru diligente kaj honeste nian parton en la komuna penado, ĉar se oni ricevas kiam li ne donas, li malhelpas al siaj najbaroj. Nur kiam ĉiu agas por ĉiuj, plenumas li sian parton de la socia kontrakto.

Tre impresa estis la simpla diservo en la arbareto. Tie, sub la ĉiela bluo, ĉirkaŭata de la naturo, oni povis senti sin proksima al Dio, en vere religia atmosfero. Oni povis senti ankaŭ la ideal-an spiriton de Esperantismo. Kaj la okazo estis alia bona pruvo de la tuta taŭgeco de Esperanto por ĉiu bezono. En la veturado, la komerco, la dramo, la poezio, la literaturo, kaj la religio, ĝi funkcias egale bone. Povu la spirito de la internacia lingvo, kaj de ĉi tiu bela diservo kresku kaj floru tra la tuta mondo!

R. T. B.

## THE EDINBURGH CONGRESS

From a letter from Mrs. Poula Parrish, Delegate of E. A. N. A.

When in later years I think about the various International Esperanto Congresses I have attended, the Edinburgh Congress will always be remembered as **The Gay, Singing Congress.** From the very begnining there was a note of gayety everywhere, and at every opportunity there was community singing by the **Kongresanaro** made possible by the interesting **kantaro** sold at the Congress.

There were many musical events, some very excellent concerts being given, with Esperanto programs. The one exception was the Glasgow Orphans' Choir, a treat so wonderful that I urge all music lovers in Usono and Canada to hear this choir when it comes here in October.

I went from London to Edinburgh in a **karavano** of 44 Esperantists representing 14 different countries, so the feeling of being in **Esperantujo** was present as soon as we were on board the train. On arriving at Edinburgh we sought our lodgings, and 140 Esperantists were at my headquarters. No sooner had I entered the salon than I was greeted by Dr. and Mrs. Cottrell,

and at once found many old friends making it seem like home. There was a real feeling of "unu granda rondo familia" where we had our meals in one big hall.

The formal opening of the Congress was on Monday morning in the Auditorium of "New College" which was also the **akceptejo.** The building was very imposing, situated on the top of the Mound; the Esperanto flag was flying from one of the towers and that of the City of Edinburgh from the other.

The opening speeches were made by Mr. Page, President of the Congress, by one of the City Councilmen in behalf of the Mayor; Robert Kreuz from the K. R. office in Geneva whose sad duty it was to inform the Congress that on account of sickness Dr. Privat would be unable to attend. The disappointment over Dr. Privat's absence was keenly felt, and probably only equalled by his own at not being able to take part in the Eighteenth Congress.

The summer university sessions were indeed a success; one by Prof. Cart, President of the Esperanto Academy; another by S-ro Andrew Ĉe on "The direct method of teaching Esperanto" using a blackboard and no textbooks in teaching. There were several on Folklore and probably the most successful was that of Prof. Bennemann of Leipsig on German Folklore, where a quartette of singers rendered twelve **popolkantojn.** The text of these songs was in Esperanto although the singers were the non-Esperanto inhabitants of Edinburgh. In thanking Prof. Bennemann and the singers, Mr. Page remarked that "for this occasion alone it would have been worth while attending the Congress."

One day was spent in a delightful trip to the beautiful Scottish **Lochs.** The scenery was gorgeous; on board the ship there was gayety everywhere; a band playing and there was singing and dancing.

The prizes for the **Oratio Konkurso** went to Dr. Olŝvenger, S-ro Major and S-ro Grenkamp.

The Ball on Saturday evening in Palais de Danse was a brilliant affair. A jazz orchestra played and a Scotch Bagpipe band filled in the intervals when we had the opportunity of seeing the various Scotch dances.

In speaking of festivals, I must mention the reception given by the City Council at the Art School. After the formal presentations a concert followed and a buffet lunch was served in the adjoining rooms.

At the closing meeting of the Congress S-ro Dominguez, representing the Brazilian Government made an eloquent speech in Esperanto; it was the first time he had used the language away from home.

The XIX will be in Danzig; success to it!

## EXECUTIVE COMMITTEE FOR 1926-27

James F. Morton, Paterson, N. J., Chairman.
John C. Bley, Chicago, Ill.
Mrs. Lucy Jenkins, Cleveland, Ohio.
**Propaganda Committee**—F. A. Hamann, Chairman.
**Publications Committee**—G. Winthrop Lee, Chairman.
**Finance Committee**—E. M. Pope, Chairman.

## BOOK REVIEW

### PALACO DE DANĜERO

No Esperantist should fail to read Edward S. Payson's translation of Mabel Wagnalls' historical romance of the days of the Pompadour. Palaco de Danĝero, indeed, was the French royal residence in the latter half of the eighteenth century, and Miss Wagnalls has constructed a tale which is true to the life of the time and history. In order to enjoy it to the full, one would do well to look up the full history of Louis XV and his various mistresses before beginning Miss Wagnalls' story.

We Esperantists owe a debt to Mr. Payson for his faithful rendering of a charming work. He has an art which few translators possess, absolute clarity. One is never in doubt as to his meaning. And he is in such complete sympathy with the author that the translation sounds like an original.

English Esperantists owe him a debt for his felicitous choice of words, which make this a valuable reading book for students of the international language. Non-English Esperantists owe a double debt: they not merely find themselves enjoying a good text, but a good story, locked in a treasure-house now opened by the Esperanto key.

D. O. S. Lowell.

## DEZIRAS KORESPONDI

Specialisto pri fruktĝardenkulturo ĉe Petrovskaja Agrikultura Akademio deziras korespondi kun Usonaj kolegoj. U. S. S. R. Moskva, Timirjazevskaja Akademio dom N 1 kv. 15. S. Krajnov. (Moskow, Union of Socialist Soviet Republics.) La koverto devas havi la adreso en ambaŭ anglo kaj esperanto.

R. E. Jarosch, Breslau, 5, Germanujo. PI.

Fino Mario Pudlova, Red. St. Drah VII/I, Olomouc, Ĉeĥoslovakio. PI. L.

S-ro Martti Mäntynen, Kerava, Finnlando. PI. L. PK.

Fino Helena Szalántzy, str. Princip. Ileana 7, Alba-Julia, Rumanio, PI. L. PK.

S-ro Albert Cronquist, Claesgatan 12 III, Malmö, Svedlando. PI.

S-ro Fritz Schenzinger, Heiligkreuzstrato 27, St. Gallen, Svislando. PI.

## FOR THE BEGINNER

### LA RIĈULO EN LA ĈIELO

A Lithuanian Fairy Tale, Told by Pulgis Lemaitis

Unu riĉa homo mortis kaj sin eksentis en ĉielo. Li vidis ceterajn ĉielanojn bele vestitajn kaj kun plej luksaj manĝaĵoj, sed li mem estis nuda, havis nek monon nek panrandeton. Ĝenerale plaĉis al li estadi en la ĉielo, sed baldaŭ li ekmalsatis kaj fariĝis al li malvarme. Ĉi tion li al neniu malkaŝis kaj almozpetadi ankaŭ ne volis. Li demandis, de kie ceteraj tiom da manĝaĵoj kaj vestaĵoj posedas. Ili respondis, ke estante sur la tero ili tion antaŭzorgis. La riĉulo kelkajn el ili ekkonis, kaj ili vivis sur tero tre mizere sed ĉi tie sin vestis plej lukse kaj plej bonguste manĝis. Li tion vidante elpetis por si reveni sur la teron por kelke da tagoj. Reveninte li ŝarĝis kelkajn veturilojn je manĝaĵoj, vestaĵoj kaj je alia riĉaĵo kaj ekveturigis tion ĉi ĉielen. Envoje unu veturilo falis, kaj unu panpeco kun vestaĵo ĵetiĝis en koton. Estante tre avara, li eltiris el koto la falintaĵon, kunŝarĝis ĉion, veturis surmonten, kaj de tie li esperis sin levi al ĉielo. Li renkontis unu almozulon. Tiu ĉi petis je Dia nomo esti almozdonata. La riĉulo ne volis tion doni al li, tamen ekbedaŭrinte donis la kotan panpecon. Alia almozulo elpetis la vestaĵon kotigitan. Antaŭe la riĉulo neniam iun estis bedaŭrinta. Troviĝinte ree en ĉielo, li ekvidis sin vestitan per kotigita vestaĵo, kaj sur la tablo staris kota panpeco. Nur nun la avara riĉulo komprenis, kiamaniere oni devas riĉaĵon deponi. Kaj ree li petis iri sur teron, sed al li ne estis permesite. Pro kio li estis tiom malsaĝa?!

### Exercises

1. Make up in Esperanto a series of practical everyday sentences containing the following words or phrases, taken from the above selection by our Lithuanian correspondent: ĉielo, sin senti, vesti, plaĉi al, malsati, fariĝi malvarme, almozpeti, antaŭzorgi, bongusta, veturi, envoje, avara, sin levi, bedaŭri, ree, deponi, esti permesite. E. g. hodiaŭ la **ĉielo** estas serena (today the sky is clear); mi **min** ne **sentas** tute bone (I don't feel quite myself). Translations may be added.

2. With the following affixes taken from the selection form for yourself ten new words for every affix, **using only the roots found in the selection**: -ul-, ek-, -an-, -aĵ-, -et-, -ad-, mal-, -iĝ-, re-, -ig-. E. g. nudulo (a naked man),monulo (a monied man), **ek**posedi (to take possession of). Add translations.

3. Write a post card in Esperanto to S-ro Pulgis Lemaitis, thanking him for his contribution, and asking to correspond with him by post card or letter, or requesting further contributions to Amerika Esperantisto.

The above exercises will be corrected free of charge by the Editor, at Moundsville, W. Va., provided a stamped and self-addressed envelope is enclosed. The best "respondonto" for the month, if more than one, will receive honorable mention in the magazine.

## Key to Word-Building Exercises in March and June Numbers

(Continued)

12. -O words: vidvo, ino, duo, vido, povo, penso, vivo, knabo.

13. -ul- words: maljunulo, estulo, similulo, patrinulino, vidulo, pensulo, malagrablulo, fierulo, vivulo, bonulo, honestulo, belulo, belulino, ordinarulo, terurulo, kontraŭulo, laborulo, riĉulo, malriĉulo, purulo, puremulo, soifulo, ĝentilulo, insultulino, malfruulo, fruulo, (tujulo), malfeliĉulo, longulo, grandegulo, malgrandegulo, naivulo, murmurulo, malbonulo, kolerulo, servemulo, kulpulo, kurulo, regulo, solulo, plorulo, fratulino, mortulo.

14. -ind- words: vidinda, aminda, vivinda, malaminda, manĝinda, trinkinda, farinda, pardoninda, rigardinda, leĝinda, batinda, plorinda, konsiderinda, akceptinda, mortinda.

15. -id- words: sinjorido, princido, feinidino, serpentido.

16. -iĝ- words: vidviniĝi, maljuniĝi, vidiĝi, fieriĝi, pleniĝi, troviĝi, varmegiĝi, dotiĝi, akceptiĝi, mortiĝi.

17. Ek- words: ekvidi, ekpensi, ekvivi, ektrovi, ekami, ekmalamo, ekmanĝi, eklabori, ekiri, ekparoli, eksalti, ekloĝi, ekopinio, ekkoleri, ekplori.

18. -ar- words: personaro, domaro, virinaro, vortaro, perlaro, nomaro, sinjoraro, vestaro, demandaro.

19. Miscellaneous formations: Trinity, female, feminine, contents, to increase, to lengthen, less, to be present, princely, to beget, (power of) sight, almighty, to fall into a brown study, abject, capable of life, abundant, along, beneficent, to make honest, concubine, to discover, to invent, tryst, intrigue, with a good appetite, extraordinary, contemporary, objection, to work out (elaborate), loveless, to disguise, wash water, to arrive, rich (in content), fair spoken, to depart, everlasting, thirsty for righteousness, peasant woman, prolix, to petrify, reason, to leave (cause to remain), fairy tale, in any case, meanwhile, water-fall, to multiply, to make pleasant, immediate, flower vase, population, hairbreadth, a cocksure person, to agree with, accommodating, to quaff, mock anger, serpentine, remarkable, innocent, solvent, princess consort, prince consort, to appropriate, patricide, regicide, welcome, triangle, collection, two-faced, lantern-jawed, tendency, interim, interval, exceedingly, flowery, to spoil, to improve, immortal, to reveal, in other words, to stone, to dive, to enter, to address, to become, to make (cause), again, volunteer, accomplice, manly, male, devoted, suicide, spectator, companion, to contradict, to subdue, subordinate, to ascend, benevolent.

## UNUFEMURA GRUO

(Italian Humor)

Resumo de novelo de Johano Boccaccio

Dum la kuiristo Chichibio estis kuiranta belan gruon por sia sinjora estro, venis al li lia amatino, allogita de la pika frandodoro, kaj lin tiel insiste petis por havi la femuron de la kuirita bongustaĵo, ke li vole-nevole devis cedi, kaj donis al sia bela amatino la avidatan femuron.

Post nelonge, kiam dum la vespermanĝo prezentiĝis la unufemura gruo al la mastro, ĉi tiu alvenigis la kuiriston.

"Diru, karulo, kien iris la alia femuro?"

"Sinjoro, ĉu vi ne scias, ke la gruoj havas nur unu kruron, kaj tial nur unu femuron?"

La estro miris pro la respondo de la kuiristo, kaj ĉi tiu dum la disputo diris:

"Mia aserto estas vera, ho sinjoro! Sed se vi ne kredas min, mi morgaŭ matene vidigos al vi vivantajn gruojn, por vin konvinki pri ĉi tiu afero."

Kune kun la estro manĝis gastoj, kaj por ne malrespekti ĉi tiujn, la mastro haltigis la disputon per jenaj vortoj:

"Bone estos por vi se vi morgaŭ sukcesos pruvi vian pravecon: sed se vi tion ne sukcesos, mi donigos al vi rekompencon tian, ke vi dum tuta via vivo min rememoros!"

La postan tagiĝon la estro, al kiu la dormado ne kvietigis la koleron, leviĝis kaj kune kun la kuiristo rajde ekiris al la bordo de rivero, ĉe kiu ĉiam komence de la tago estis gruoj.

Ho, kiel volonte la malfeliĉa kuiristo estus forkurinta! Sed tion li ja ne povis. Li ade rigardis ĉiuflanken, timegante aperon de gruoj starantaj sur du kruroj; sed bonŝanco volis, ke al iliaj rigardoj aperu dekduo da gruoj, starantaj sur unu kruro, kiel tiuj birdoj kutimas dum dormado.

"Via moŝto bone povas vidi," diris gaje la kuiristo, "ke mi hieraŭ ne mensogis, ke la gruoj havas ja nur unu kruron, kaj tial nur unu femuron!"

"Atendu, fripono!" respondis la mastro, kiu alproksimiĝinte al la birdoj laŭte ekkrias:

"Ho! ho!"

Pro tiu krio ĉiuj gruoj, ekvekiĝinte, tuj elmetis la antaŭe kuntiritan kruron, kaj ekforkuris.

"Ĉu vi persistas en via aserto, ke la gruoj havas nur unu kruron?"

"Sinjoro, sed vi ne ekkriis ja al la rostita gruo, kiel al ĉi tiuj: 'Ho! ho!' Se vi tion estus farinta, ĝi sendube estus elmetinta la duan femuron, kiel faris ĉi tiuj."

Al la mastro tiel plaĉis la sprita respondo, ke lia tuta kolero aliiĝis en gajecon kaj ridon, kaj pro tiu respondo li paciĝis kun la sagaca kuiristo.

Noto Biografia

Giovanni Boccaccio, naskiĝinte en Paris en 1313, mortis en Certaldo, Italujo, en 1375. Li estis la plej granda novelisto de Italujo. En sia "Decamerone," kiu estas aro de liaj noveloj, krom artisma valoro, troviĝas trafa pentraĵo de la vivado dum la XIIIa jarcento. Ne mankis al li merititaj honoroj, sed malgraŭ tio li vivadis en malriĉeco. La fama poeto Petrarca en sia testamento donacis al li 50 orajn florenojn, "por ke li aĉetu al si veston por sin kovri dum la maldormadoj de la vintraj noktoj"!

Kontribuis A. Mazzolini.

## SECOND COURSE IN ESPERANTO

### LECIONO XIII

**Tago kaj nokto** **La horo**

Tage (en la tago) la suno brilas. **Nokte** (en la **nokto**) brilas la luno kaj la **steloj.** Super la tero estas la **ĉielo.** La ĉielo estas blua. Sur la ĉielo estas loĝejo de **Dio** kaj la anĝeloj. La Kristanoj **kredas** (opinias) ordinare, ke Jesuo Kristo estas Dio. Dio kreis la ĉielon kaj la teron.

La unua parto de la tago estas la **mateno.** La **meza** (centra) momento de la tago estas **tagmezo** (12 tgm.). La parto de la tago antaŭ la tagmezo estas la **antaŭtagmezo** (atm.). Post la tagmezo ni havas la **posttagmezon** (ptm.) La fina parto de la tago estas la **vespero.** Vespere la ĉielo estas ofte ruĝa. Post la tago ni havas la **nokton.** La meza momento de la nokto estas la **noktomezo.** En la ekstrema nordo oni vidas la noktomezan sunon.

Estas dudek kvar horoj en ĉiu tagnokto (tag-nokto). Oni mezuras la tempon per horloĝoj kaj kronometroj. La praaj horloĝoj estis sun- kaj akvohorloĝoj. La horloĝoj **tiktakas** (tik! tak! tik! tak!). Ili **batas** la horojn. **Je** l'unua horo ili batas unu **fojon,** je la dua du fojojn, ktp. Ili tiktakas sesdek fojojn en ĉiu minuto, unufoje por ĉiu sekundo. Je la sepa (horo) la servanto vekas la familion. Je la sepa kaj du-on-o (7.30) ni **matenmanĝas** (maten-manĝas). Je l'oka kaj kvar-on-o (8.15) ni komencas la laborojn de la tago. Je kvarono antaŭ la dek-dua (11.45) ni havas **tagmanĝon.** Je dek minutoj antaŭ la unua (12.50) ni **rekomencas** (re-komencas) labori. Je la kvina **ree** la laboro haltas. Je dudek kvin (minutoj) post la kvina (5.25) ni **vespermanĝas.** Post la vespermanĝo ni amuzas nin, **legas** gazetojn kaj **librojn,** skribas

leterojn, ktp. La unua gazeto, kiun ni legas, estas Amerika Esperantisto. La libro, kiun mi nun legas, estas "Ben Hur," kies aŭtoro estis Lew Wallace. Je la deka horo nia familio **iras dormi.**

De la suno ni ricevas varmon kaj **lumon.** De fajro ni ricevas varmon. De lampo aŭ kandelo ni ricevas **lumon.** En la tago ni havas lumon (estas lum-E). En la nokto ni havas **mal**-lumon (estas **mal**-lum-E). En somero estas varme. En vintro estas mal-varme. La servantoj de la kompanio strikas ĉar ili estas mal-kontentaj. La tajloro estis malhonesta kaj ŝtelis la materialon de la pantalono. Aleksandro estas maldiligenta kaj nenion lernas. Malfreŝa pano estas tre digestebla. La portreto malsimilas al la originalo. En vintro la tagoj estas mallongaj kaj noktoj longaj. En somero la **malo** estas. Leciono en greka lingvo estas tre malsimpla. La patro estas malriĉa sed honesta. Malrapide sed certe progresas la afero Esperanta. La fenestroj estas malpuraj, do mi ilin **lavas** per pura, varma akvo. La studento estas malĝoja, ĉar lia patro mortis. Li malatentas nun la studojn. La bandito estas malnobla homo—malhonesta, maljusta kaj malkuraĝa.

Se oni lernas aferojn praktikajn, ne necesas ilin poste mallerni. La striko malorganizis la komercon kaj industrion de la lando. Se vi ne persistos en viaj studoj, vi malsukcesos ĉe l'ekzamenoj. Matene la suno aperas; vespere ĝi malaperas. Ĉiuj homoj de honoro laboras; mallaboras nur vagabondoj. La revuo akceptis la manuskripton de la proz-aŭtoro, sed malakceptis tiun de la poeto. Vi malhelpas min en mia tasko. En nia klimato malofte estas tre varme. La malherooj maltriumfis en la batalo. Malantaŭ nia domo ni havas flor- kaj legom-ĝardenon.

La sufikso **-on-** formas frakciojn el la fundamentaj numeraloj.

La prefikso **mal-** formas la **kontraŭon** de la fundamenta vorto **(ne simple la negativon).** Oni uzas ĝin kun substantivoj, adjektivoj, verboj, adverboj kaj prepozicioj (kun la lastaj malofte).

## Questions

1. Note the adverbs **tage, nokte, vespere, matene.** On the analogy of these render with a single Esperanto adverb the English phrases: "at noon, in the forenoon, in the afternoon, at midnight, in summer, in winter."

2. Would you say that adverbs are used more or less frequently in Esperanto than in English?

3. Adverbs like **sincere, rapide, sufiĉe** are adverbs of MANNER, answering the question "HOW?" What question, now, do adverbs like **tage, nokte** etc. answer, and therefore what kind of adverbs are they?

4. What is the Esperanto idiom for "the sun [or any other heavenly body] **is in the sky"?**

5. How would you render in Esp. the abbreviations "A. M., P. M., N." in reference to time?

6. Can you distinguish in Esperanto "day," meaning the period from sunrise to sunset, from "day," meaning a calendar day, of twenty-four hours. If so, how?

7. With **fojon** we begin to have a new use of the accusative. **Fojon** is obviously not the object of the verb **batas.** Note in the next sentence its exact equivalent in the adverb **unufoje.** In English, adverbs like "once, twice" etc. are known as adverbs of NUMBER. So what does this new use of the Esp. accusative express?

8. Translate: "eleven o'clock, half past four, a quarter to eight, a quarter after three, twelve minutes of nine, twenty-five minutes after one."

9. How would you say in Esp. "I'm going to bed."?

10. Note the expressions **estas lume, estas mallume, estas varme, estas malvarme.** On the analogy of these translate: "It is sunny. It is moonlight. It is starry. It was long that I stood before the door. It is fresh and pure in the park. It will be gay at the congress."

11. What does "it" express in the English sentences above? Is such an "it" rendered in Esperanto? What is the subject of sentences like **estas lume, estas varme**? When a subject is so indefinite that it is expressed in Eng. by "it" and in Esp. not at all, what part of speech is used in Esperanto in describing it?

12. Does an Esperanto adjective always modify a definite noun or pronoun? When such is absent and cannot be supplied what part of speech is used instead?

13. Classify, before going farther, the three uses of the adverb, the two uses of the accusative, and the two uses of the article we have thus far had.

14. With what class of words is the suffix **-on-** used, and what does it express? Since suffixes are quite freely used as independent words, what would **ono** mean?

15. What is the use of the prefix **mal-**? N. B. Do not confuse with the suffix **mal-** as ordinarily used in modern languages, rendering the idea of "evil" (Latin **malum**). Esperanto **mal-** has **in itself** no implication of either "good" or "evil," its force being entirely of another order.

16. With what parts or speech is **mal-** used?

17. Can **mal-** ever express a pure negative?

18. Tho certain roots are more particularly used as affixes, as a matter of fact **any** short root in Esperanto may be used as an affix, (either prefix of suffix). Bearing this in mind what would you say would make the best **negative** prefix in Esperanto Can you render the words "non-Esperantist, unneces-

sary, immature"? (From its nature **mal-** would in such cases be incorrect.)

19. Give from the context the meaning of the following new words:

Substantivoj. **nokto, stelo, ĉielo, Dio, mateno, tagmezo, antaŭtagmezo, posttagmezo, vespero, noktomezo, fojo, libro, lumo.**

Adjektivo: **meza.**

Verboj: **kredi, tiktaki, bati, matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi, legi, iri, lavi.**

Prepozicio: **je.**

## ENGLISH KEY TO LESSON XII

**Korpo** (cp. corpo-real), body, **buŝo** (embouchure), mouth, **mentono,** chin, **nazo** (nas-al), nose, **vango,** cheek, **brovo,** eyebrow, **frunto,** forehead, **okulo** (ocul-ist), eye, **orelo,** ear, **kapo** (cap-ital), head, **cerbo** (cerebral), brain, **dento** (dent-al), tooth, **lango** (lang-uage), tongue, **kolo,** neck, **nuko,** nape of neck, **brusto,** chest, breast, **ventro** (ventr-iloquist), abdomen, **dorso** (dors-al), back, **membroj,** limbs, **brako** (brach-ial), arm, **kruro** (crur-al), leg, **ŝultro,** shoulder, **kubuto** (cubit), elbow, **mano** (man-ual), hand, **genuo,** knee, **piedo** (pedal), foot, **hepato** (hepat-ic), liver, **reno** (ren-al), kidney, **ezofago,** esophagus, **gorĝo** (gorge), throat, **pulmo** (pulmo-nary), lung, **sango** (sang-uinary), blood, **koro** (cor-dial), heart. **Ruĝa** (cp. rouge), red, **bruna,** brown, **nigra** (negro), black, **griza,** grey, **verda** (verda-nt), green, **flava,** yellow, **purpura,** purple, **sana** (san-itary), well, **flari,** to smell (something), **vidi** (visible), to see, **aŭdi** (audible), to hear, **pensi** (pens-ive), to think, **maĉi,** to chew, **gustumi,** to taste, **palpi** (palp-able), to feel (use sense of touch), **nomi** (nomi-nate), to name, **gluti** (de-gluti-tion), to swallow, **spiri** (re-spire), to breathe, **vivi** (vivi-d), to live, **morti** (mort-al), to die. **Super** (super-ior), above, **ekster** (exter-ior), outside of, except.

---

## MALPERMESA LEĜO DE FINNLANDO

(Prohibition in Finland)

de Erkki P. Turunen

Malpermesa leĝo de Finnlando ne estas produkto de hieraŭa tago, ĉar jam dum jaro 1854 oni faris unuan proponon pri starigo de ĝi. Poste oni faris multajn diversajn proponojn por ĝi, sed neniu el ili ricevis bezonatan subtenon. Sed fine, kiam respubliko tute liberiĝis, tiam estis preskaŭ unua laboro de parlamento starigi malpermesan leĝon al la popolo. Ĝi stariĝis je la 1-a de Junio, 1919. Laŭ ĝi estas ĉia uzado kaj vendado same kiel aĉetado de ĉiuj alkoholaĵoj malpermesita en la tuta lando.

Kion kaŭzas abstinenco? Al tiu demando oni povas tuj respondi: nur bonon—bonon al ĉiuj popolanoj kaj al ĉiuj popolklasoj. Jen ĉi-sube mi per kelkaj aferoj deklaras, kion malpermesa leĝo kaŭzis en Finnlando:

La ekonomia situacio de la lando fortiĝis jene:

Deponoj de popolo en bankoj en jaro 1910—Fmk. 989,920,644; en 1923—Fmk. 9,300,013,200.

Vere la lando per aliaj rimedoj multe fortiĝis, sed estas ja kredeble, ke abstinenco ankaŭ kaŭzis tion.

Higiena bonstato pliboniĝis dum 22 jaroj jene:

En jaro 1910 mortis el ĉiuj 1,000 loĝantoj de la lando ĉirkaŭ 27 personoj.

Dum jaroj 1910-20 mortis el ĉiuj 1,000 loĝantoj de la lando ĉirkaŭ 17 personoj.

En jaro 1921 mortis el ĉiuj 1,000 loĝantoj de la lando ĉirkaŭ 14 personoj.

En jaro 1923 mortis el ĉiuj 1,000 loĝantoj de la lando ĉirkaŭ 13 personoj.

Do mortemo multe malgrandiĝis dum malpermesa leĝo, kaj ĝi estas nun pli malgranda ol neniam antaŭe.

Krimeco dum malpermesa leĝo:

En jaro 1913 oni faris en la tuta lando krimojn entute 16,529.

En jaro 1923 oni faris en la tuta lando krimojn entute 13,499.

Dum 10 jaroj do krimeco malgrandiĝis preskaŭ 19%.

Jen ĉi-supre mi prezentis per kelkaj ciferaj dokumentoj kion bonan la malpermesa leĝo alportas al la tuta lando kaj popolo.

Sed ĉiu bona afero en la mondo ĉiam havas amikojn kaj malamikojn. Tiel ankaŭ malpermesa leĝo en Finnlando. Tuj kiam la parlamento decidis pri ĝi, tuj aperis aro da senmoralaj homoj kaj komencis sekrete importi ĉiujn alkoholaĵojn kaj vendi ilin en la lando. Importo de alkoholaĵoj kreskis, multe da alkoholaĵoj fluis al la lando, plejparte el Estonio, Germanujo kaj el aliaj najbaraj landoj. Nuntempe oni faras sekretan importon de alkoholaĵoj pli malmulte, ĉar punoj pri malsobraj krimoj estas nun pli severaj ol antaŭe. Se la importo tute ĉesiĝos, tiam oni povos esperi pli luman tempon al la malpermesa leĝo de nia lando.

Abstinencaj societoj, kiuj troviĝas en Finnlando eĉ en plej malgrandaj kamparvilaĝetoj, faras plej bonan propagandon por abstinenco. En ĉiuj societoj oni aranĝas de tempo al tempo paroladojn kaj edukajn kunvenojn, en kiuj al ĉeestantoj oni deklaras la gravan ideon de abstinenco. Krom tiuj oni aranĝas dum ĉiu jaro apartajn abstinenc-semajnojn, en kiuj partoprenas preskaŭ la tuta popolo, kaj dum kiuj en ĉiuj urboj kaj vilaĝetoj per ĉiuj iloj kaj rimedoj oni memorigas pri abstinenco. Multaj estas ankaŭ aliaj propagandrimedoj por abstinenco, kaj tre multaj estas jam la fruktoj, kiujn laboro donis. Sed la fina venko de finnaj abstinenculoj estas ricevota nur per laboro forta, ke post ĉio la suno per siaj radioj origu kaj feliĉigu Finnlandon kaj ĝian popolon abstinencan. Tio estas plej alta sed espereble ne tro granda revo de ĉiuj finnaj abstinenculoj.

## OFFICIAL ROOTS APT TO BE MISUSED ESPECIALLY BY ENGLISH-SPEAKERS

(Continued)

**Agaci**—lit. "to set on edge (of teeth), hence fig. "to irritate or annoy."

**Agiti** means "agitate" only in the sense of stirring up some public enterprise (political, social, etc.). When one is "agitated" one is **emociita.**

**Agonio** does not mean "agony" **(dolorego)**, but a dying state, "the point of death." Hence **agonii,** to be at the point of death, at one's last gasp.

**Agrafo** is a "clasp" (any sort of device for two loose ends together except **buko,** a "buckle").

**Agronomio** is a "highfalutin" word for **terkulturo,** farming. Perhaps it connotes "scientific farming."

**Akceli,** lit. means to "accelerate" (add to the speed of), but commonly used as Kabe defines it, figuratively: "Plirapidigi kaj samtempe helpi, sukcesigi: La aliĝo de famaj scienculoj forte akcelis la progreson de Esperanto." It exactly renders Eng. "to promote" (an enterprise).

**Akcenti**—to **emphasize** (in addition to the lit. sense of "to put the word-accent on"). **Emfazi,** by the way, is entirely incorrect for this sense; for **emfazo** is not emphasis" but "expression" in public speaking (see Marta (L. R. III, 290, 291,), and the Vortaroj of Kabe and Boirac).

**Akcipitro** acc. to Kabe, Verax and Boirac means "goshawk," but seems also to be used for any kind of a hawk. **Falko** is a falcon, **nizo** a sparrow-hawk.

**Akrido** is a locust, while **lokusto** is a grasshopper. The latter is not yet an official word.

---

### Internacia Instituto de Intelekta Kooperado Ekuzas Esperanton

(El Heroldo de Esperanto, 30 Julio, 1926)

Internacia Instituto de Intelekta Kooperado en Paris invitis S-ro S. Grenkamp, traduki komunikojn de la Instituto por publikigo en Esp. gazetoj.

Tiu ĉi sukceso, atingite per la klopodoj de S-ro Grenkamp, estas sufiĉe atendinda, ĉar longtempe la Instituto ne inklinis al uzado de Esperanto.

Ni kredas, ke la Instituto estos kontenta pri la utilo, kiun ĝi havos per la uzado de Esperanto, kaj esperas, ke multaj similaj internaciaj institucioj sekvos ĝian ekzemplon, same aplikante Esperanton por siaj celoj.

## ATENTU ALILINGVULOJ!

En ĉiu lando neanglalingva ni ĝoje akceptus **regulajn korespondantojn,** kiuj sendus al ni freŝajn artikolojn kaj novaĵojn ĉiumonate. De tiuj, dum fidela deĵorado, ni presus la nomojn sur la fronto de nia gazeto, kaj sendus al ili po du konstantaj abonoj, kaj ekstraj numeroj (laŭ peto) por propagando.

---

Railway Men or Women interested in Esperanto are asked to send their names to Edward M. Rosher, 125a Beulah Street, San Francisco, Calif., Delegate for the

### INTERNACIA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

This Esperanto organization aims to unite railway people throughout the world for their mutual benefit. It has representatives in some twenty different countries and issues a monthly technical Revue, which includes an Esperanto Railway Dictionary.

---

## RADIO

**Minneapolis, Minn.** An Esperanto course conducted by Prof. Edwin L. Clarke begins October 4, over WCCO, University Hour, with two preliminary talks in English: lessons begin October 18.

---

## BOOK ANNOUNCEMENTS

The Complete Bible in Esperanto, Zamenhof

| | |
|---|---|
| Cloth Binding | ~~$1.50~~ 1.75 |
| Cloth Binding, India Paper, gilt top | 2.25 |
| Persian Morocco | 3.25 |
| Yapp, leather lining | 5.00 |

PRICES OF BIBLE SUBJECT TO CHANGE

La Palaco de Danĝero (Wagnalls) translated by Edward S. Payson, Hon. Pres. E. A. N. A.
(Rakonto de Madame Pompadour)

| | |
|---|---|
| Cloth Binding, artistically decorated, 200 pp. | $1.50 |

Proverbs: Esperanto-English
from Zamenhof's Proverbaro, English by M. C. Butler

| | |
|---|---|
| pocket size, Persian Yapp or Antique Leather | .50 |

**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**

**Pierce Building, Copley Square, Boston, Mass.**

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT — A CLASS THEN AND THERE

BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE

Drop us a postcard for a catalog

THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

## ISOLATED STUDENTS!

The editor of Amerika Esperantisto, formerly chairman of examinations of E. A. N. A. offers

### A PRACTICAL CORRESPONDENCE COURSE
in
### ESPERANTO

in three terms of fifteen lessons each.

This course is guaranteed to prepare one for the advanced examination of E. A. N. A. and give one a thoro working knowledge of the language.

Instruction is individual, and in case of failure to pass the E. A. N. A. advanced examination upon completion of the course free coaching will be given until the student passes.

Payment is required in advance, but a student may stop work at any time, and fees will be refunded covering the uncompleted portion of the course.

Price of lessons (including constant individual instruction), per term, $15 (in advance).

Entire course (three terms, in advance) $40.

**Special Elementary Course.**

Those following the Elementary Lessons now running in Amerika Esperantisto may receive individual instruction and examination upon these lessons, with guarantee to prepare the student to pass the preliminary examination of E. A. N. A., at the special price of $5 per term of ten lessons (in advance). Payment subject to refund pro tanto if work discontinued.

Herbert M. Scott, L. K.,
Moundsville, W. Va.

Save Money on Your

PERIODICAL SUBSCRIPTIONS

Lowest Club Rates on Your List.

We make a Specialty of furnishing Magazines of all kinds wherever published, to subscribers anywhere.

Send us your Magazine orders for Quotation

THE PALMER CO.
120 Boylston St. Boston, Mass.

TUCKER TEACHERS' AGENCY, Inc.
120 Boylston Street
Rooms 516-517-518-519
Boston, Mass.

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj $20. po paĝo—¼ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo $150. Perantoj skribu, pri rabato.

# STUDY ESPERANTO

**ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY REASONABLE INVESTIGATOR**

**as the one PRACTICAL auxiliary language**

**Recognized and in use as such since the World War by:**

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle, Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg, Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

**UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY**

**By vote of September 21, 1922**

# HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

## CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA

**and courses by correspondence may be arranged for anywhere**

(If you lack details as to local courses write today to)
**The Central Office of the Esperanto Association of North America**
**507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies**